

# R. TOBELL

Eidonisto de CLAU ESPERANTO kaj POŝVORTARETO

18, Carme, 18 - Barcelona  
ESPERANTA PRESEJO

## TUTMONDA ESPERO

Organo de la kataluna esperantistaro

Aperas nur en esperanta lingvo; literaturo, scienda kaj eksterlanda novaĵoj, rakontoj, notizaĵoj por instruada praktiko k. t. p.

BARA ABONO / Eksler Hispanujo. 4 frankoj (1'60 sm.)  
Ea Hispanujo . . . 3 . . . (1'20 . . .)  
DUU QUMERO . . . . . 40 cimoj. (0'40 sd.)  
Por la abonantoj kaj kunlaborantoj 25 . . . (0'10 . . .)

Specimeno nenombita numero estas ricevebla po sia valoro.

Ĉiuj mendoj devas esti akompanitaj de mono.

Ĉiuj manuskriptoj estu firmitaj per germana, francaj aŭ hispanaj poŝtmarkoj; per franca, rusa aŭ hispana papermonero; per literaturaj respondekspostoj da la st. kaj per ĉekoj aŭ transpagiloj de la ĉekbanko Esperantista.

Oni bonvolu skribi legeble sur respondekpostkarto, aŭ aldoni respondekposton al la letero, se oni postulas respondon. Ĉiu nova abonanto ricevos senpage la eksterordinaran numeron de la V.º Kongreso, samtempe ke li havas la rajton akiri la kolektojn de la jaroj 1908, 1909 kaj 1910 por la duono de sia valoro, t. e. po 1'50 fr. (sm. 0'50) ĉiu kaj kiel la ceteraj abonantoj, povoz. mendi, por ĉiu ĉiu anoo la tuta jaro, tridiman anonceton.

### ABONANTOJ

Francoj: Librejo de Esperanto, 15, rue Montmartre - Paris

Katalunio:  
S-roj Sañer kaj K.º, Presejo - S. Felix Guixols.  
S-ro Rosals - Portaferrisa, 31, Barcelona.  
S-ro J. Palmerola, P. Major - Vic.  
S-ro J. Quintana, Cases Noves - Palafrugell.


### TARIFA POR ANONCOJ

Tuta pago. . . 12 frankoj (1'80 sm.)  
Duono da pago 7 . . . (2'80 . . .)  
Kvarono . . . 3'50 . . . (1'10 . . .)  
Okono . . . 2 . . . (80 sd)

Anoncetoj por peti korespondadon kostas 10 cimoj (sd) ĉiu linio.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO  
Tallers, 81 - Barcelona

Pri administraciaj aferoj sin turni al S-ro B. Anglada



## LAMPARA C.

de filament metallic

Reunicez totes les ventatges de la millor estrangera

Dura 2000 hores i es la més resistent

i un 40% mes barata

Preu unic, de 16 a 75 bagies, 2 PESSETES

Deposil i venda i BARCELONA:

Rambla de les Flors, 16, entlo

Oni parolas kaj korespondas komerce per Esperanto

## ★ ★ Esperanta ★ ★ Biblioteko Internacia

Tiu-ĉi biblioteko enhavas facilajn legajojn de ĉiulandaj eminentaj esperantistoj. Ĝi tial horege taigas per ekzercado de la lingvo ĉu dum la grupaj kunvenoj ĉu per privata legado.

Prezo po kajero 0,10 Sm (0,20 M.)  
Seriede 12 volumoj (afrankite) 1,25 Sm (2,50 M.)  
Ĉiu libreto enhavas 40 - 50 pagojn.

Esperanto Verlag Möller & Borel

Berlin S. W., Linden - Strasse 18 - 19.


Por Hispanujo: Joan Rosals, Barcelona, strato Portaferrisa, 30

**Bazar Esperantista**

Specialeco en la mezuro de ŝmizoj por viroj. Konfekcioj por sinjorinoj kaj scinfanoj, kravatoj, poŝtukoj, gantoj, parfumoj, trikotajoj kaj aliaj artikoloj.

Tratador, 2, Junqueres, 18  
BARCELONO

# TUTMONDA ESPERO



## AVIZO

Tiel tre insiste kiel plej ĝentilmaniere, TUTMONDA ESPERO petas al siaj kolegoj bonvolu konstati, ĉiam ili anoncos ĝin, ke ĝi estas: nur per Esperanto redaktata; ĝia kosto, por la eksterlandanoj, 4 frankoj (1'60 Sm.) jare: la loĝejo de la Redakcio kaj Administracio, Strato Tallers, num. 81. - Barcelona.

Barcelona, Majo 1911

40 cent.

# MISTERA KRIMO

Amuzza unuakta komedioto. 1 fr. (0'400 sm.)

# Unu fojon...!

Humoraĵaro laŭga por la Esperanta lernado. 0,30 fr. (0'120 sm.)

Mendebinaj ĉe MIKAELO CASES, Strato Salmeyón, 229, 4.º - Barcelona (España)

## REKLAMOJ en la KONGRESLIBRO kaj en la KONGRESGAZETO

Pri tiuj reklamej, oni bonvolu sin turni: por Hispanujo al la sola agento: Societo «ESPERO KATALUNA» Str. Tallers, 81 (Barcelona).

### PREZOJ:

	1 paĝo	1/2 paĝo	1/3 paĝo	1/4 paĝo
Kongreslibro	20 Sm.	12 Sm.	7 Sm.	4 Sm.
Kongresgazeto	1 numero	20 »	12 »	7 »
	2 numeroj	30 »	18 »	10 »
	3 »	35 »	21 »	12 »
	4 »	40 »	24 »	14 »
	5 »	45 »	26 »	16 »
	6 »	45 »	27 »	17 »

Reklamfolioj, cometotaj en la Kongresgazeton (unuobla), ne pli grandaj ol la formato de la gazeto, presigita de la reklamanto: 1 numero 12 Sm., 2 n-oj 18 Sm., 3 n-oj 21 Sm., 4 n-oj 24 Sm., 5 n-oj 26 Sm., 6 n-oj 27 Sm.

### KORESPONDANTA FAKO-Kosto de tiuj ĉi anoncoj: po 0'20 frankoj ĉiu linio

Franz Link — München — Auenstr. 44 — Germanujo. Bavarujo. Deziras korespondi kun la tuta mondo per koloraj kartoj — Li ĉiam al ĉiuj respondos.

S-ro. B. Makeš, Harantova, 244 — Praha — Zizkov — Bohemujo — Deziras interŝanĝi koloritajn belajn p. k. Ĉiam li tuj respondos.

# TUTMONDA ESPERO

Ĉiumonata ilustrita revuo organo de la kataluna esperantistaro

Redakcio kaj Administracio: TALLERS, 81-BARCELONO (Societo «Espero Kataluna»)

4ª Jaro

Barcelona, Majo 1911ª

N-ro 39

**ENHAVO:** Bona konsilo. — Gaja kristnaska meditado priadamo kaj Esperanto. — Al belulino. — Al fieruloj. — Homarujo. — Malnovaĵ botoj. — La heroino. — La antikvaj monumentoj de Barcelona. — Pri monato Majo: — 7ª Internacia Kongreso de Esperanto. — Diversej scilgoj. — Humoraĵo. — Bibliografio. — Anoncoj.

## BONA KONSILLO

Konsilo ne demandata ofte ne estas akceptata. Tamen mi riskas fari modestan proponon, kiu eble tre agrabligos la estontan internacian kongreson. Mi estas spertulino; ĉar mi jam partoprenis en kvar kongresoj, mi povas eldiri vorteton.

Cambridge (Kembriĝo) estis mia unua kongreso. La unuan fojon mi vidis alilandajn samideanojn, mi nur malmultajn konis. Mi kunhavis bonan provizon da vizitkartoj, kiujn mi interŝanĝis je gesinjoroj, kun kiuj mi hazarde konatiĝis. La aliaj kongresanoj uzis notlibrojn, malkare haveblajn, por kolekti aŭtografojn. Mi preferis la kartojn, ĉar sur ili la nomoj estis pli bone legeblaj. Unu samideano kunhavis la albumon de Schuck, kun la portretoj de konataj Esperantistoj. Tio estis bona ideo; per helpo de albumo oni en la fino de la kongressemajno sciis, kiuj estis la sinjoroj sur la strado, oni konis bone rektoron Boirac kaj doktoron Mybs, oni ne konfuzis la profesorojn Cart kaj Bourlet, kompreneble oni ankaŭ konis la faman trion: Pollen, Cunningham kaj Mudie. Sed la aliaj? Ho ve! Kiu estis tiu? Kiuj trajtoj apartenis al la karto, al la aŭtografoj?

La sama embaraso en Dresden, Barcelona kaj Washington! Ĉie ni aĉetis ekzemplerojn de la grandaj, kolektaj bildoj montrantraj la gekongresanojn. Sed reveninte hejmen ni vane provis memori la nomojn. En Barcelona ni havis tre belan kongreslibron kun multaj blankaj folioj por aŭtografoj, sed denove aperis la maldolĉa demando: kiu estas tiu?

Nur unu escepto sin trovis. Kelkaj sinjoroj kaj unu sinjorino havis siajn portretojn sur la vizitkartoj. Jen la solvo de la problemo! Nomo kaj adreso bone presitaj, la portreto apude, la kartetoj trovas lokon en ĉiu paperujo, eĉ en la saketo de sinjorinoj, ofte oni rapide pririgardas - forgeso ne estas ebla.

Mia konsilo kaj propono nun estas, ke ni ĉiuj havu vizitkartojn kun nia bildo, ni ilin interŝanĝu. La karto fariĝas per la portreto pli valora, ĝi estas malgranda donaco, kara memoraĵo.

Ĝi, anstataŭos la nelegeblajn aŭtografojn, kiuj estas krom tio veraj turmentadoj.

Mi tre ĝojus, se la karaj gekongresanoj akceptos mian konsilon; mi petas, ke ĉiuj gazetoj ĝin represigu.

Ĝis revido en Antverpeno!

MARIE HANKEL

## GAJA KRISTNASKA MEDITADO PRI ADAMO KAJ ESPERANTO

(Daŭrigo)

Vi, ruzaj grandsinjoroj, ne elturniĝu, ke tion faris Israelidoj, kiuj en sia hebrea skribo ĉion devas legi de malantaŭen.

Sed Adamon ni devas tamen senkulpigi, ĉar li havis sole unu ordonon. En la komenco Ĉiela Patro al Adamo sole diris: «Preĝu!» Li nenion diris plu, nenion ordonis plu, eĉ pri ia laboro; ĉar Li kiel bonega patro sciis, ke Li mem devas en la komenco labori pro sia homfilo, ĉar Adamo estis ankoraŭ tre juna.

Li certe sciis, ke juna homo devas iam en la vivo ekbruegi, eble iom ekribeli, antaŭ ol malmola sorto alvokos kaj aljungos lin al peza laboro. Ben Akiba certe ankaŭ dirus pri tio, ke Patro Dio bone tion ekprovis jam je Adamoj de aliaj grandaj mondoj.

Malbonaj ekzemploj difektas bonajn morojn. Kia miro, ke Adamo de sia maldelikata societo ankaŭ iom difektiĝis?

Ni scias el ĉiutaga vivo, ke homoj, iom maldelikataj, neniel okupitaj en sia malĝojo komencas trinki, precipe, se ili havas sufiĉe da trinkaĵo, kiel Adamo en paradizo, kies vino havis certe tri «s», ĉar ĝi estis: senbapta, senpaga kaj superflua.

Estas ankaŭ konsiderinda, ke li ĝin trinkis kun la diablaj serpentoj kaj simioj. Eble Adamo trinkis la vinon kiel Noaho nekonante ebriiĝecon de tiu trinkaĵo; liaj simioj lin imitante kaŭzis iajn skandalojn, ĉar ili promanante kun serpentoj en paradizo paŝis zigzage, ŝanceliĝis kaj en granda krio kaj ridego ruliĝis, pro kio najbara ĉielo estis terure indignigita.

Sed oni devas ankaŭ tion senkulpigi, ĉar tiam ankoraŭ ne estis leĝoj kontraŭ alkoholismo.

Tio ankoraŭ signifus nenion, se nia Adamo ne estus komencinta tuj rabie furiozi, kaj ho vel Li komencis sovaĝe frapi sur ĉielpordego postulante persiste ankaŭ ian vivkunulinon ĉar li volis vivi gaje kiel la bestoj. Ho ve! eksiblis la vento tra la foliaro kaj najtingaloj pro honto forflugis.

Pro indulgema kaj malsevera Dio, kion faris Adamo? Pro tio severe li devis esti punita kaj Dio en sia justeco terure lin punis per tio, ke li tuj plenumis lian deziron.

Kiam Adamo dormis, Sinjoro Dio el lia pekema korpo prenis ripon kaj kreinte el ĝi virinon belegan, kiel la luno, nomis ŝin Evo. Tiu ĉi Evo estis elektita de Dia justeco, kiel anĝelo de venĝo por puni Adamon pro lia ribeliĝo. Eva tial heredis per Adama rompebla ripo kelke da liaj malbonaj ecoj. Kia do miro, ke ĝis la nuna tempo oni ankoraŭ diras, ke laŭ Evo multa virino estas vera kruco por viro: iomete spionada kaj kalumniema, iom disputema kaj obstina, iam dorlotema kaj plorema, ĉiam frandema kaj time- ma, ankaŭ ke eble ŝin helpadas misteraj fortoj «ke ŝi belulino, gracia anĝelo tuj post la edziniĝo aliformiĝas en vera demono, kiu enportas inferon en viran hejmon» (Laŭ, Novejarque Anĝelo).

Kiam Adamo vekigis kaj sian ĉarmegan, fenomenan edzinon ekvidis,

pro surprizo estis kvazaŭ muta, pro flama ekstazo estis tute forgesinta paroli, li ne memoris eĉ unu vorton de sia propra homa lingvo.

Poste, kiam li tamen paroli komencis, lia voĉo eksonis, ne kiel dolĉa homlingvo, sed kiel abomena, raŭka elefanta blekado, kio kaŭzis eĉadon teruran el paradiza arbaro, ke Evo pro timo svenadis.

Adamo perdinte inter la bestoj la noblajn morojn ne sciis, ke lia potenca kriado ne estas konvena, ne estas imponanta efekto por konfidsigno de lia amo kaj admiro; li ankoraŭ ne konis virinon. Li devis scii ke sinnekonado kaj devigata sinaltudado estas grandaj malhelpaĵoj de kompreniĝo. Kia miro ke ankaŭ lia gracia edzino, pro nekomprenado, ne volis vivi kun li, en sia fiereco, ŝi eĉ vidi ne volis lin. Fine forkuris Evo ien kun granda serpento el lia armeo, ĵus kun tiu kiu estis lia sekreta konsilanto.

Pro tio Adamo estis tute malfeliĉa, ĉar li amis la ĉarman Evon pasie kaj ŝin adoris per ĉiuj fortoj kiel diinon. Li povis nek manĝi, nek trinki, li nur ploris, ploregis kaj serĉis nur sian Evon, sian belulinon.

Verda stelo leviĝis sur firmamenton por sciigi la venon de Dio kaj Adamo ploranta iras renkonte al sia Kreinto kaj vokas plenkonfide: «Ho, mia Dio, kompatu min pekulon kaj helpu, helpu, helpu!»

Kaj Dio diris: «Adamo, Adamo! Ĉu vi ne scias, ke vi devas per via prudento apartiĝi el la medio vin ĉirkaŭanta, ĉu vi ne estas homo? Ho, vekigiu el via duondormado, ho, vekigiu kaj estu homo pensanta, kaj ekkonu, ke via plej granda malamiko estas la peko, kiu produktas viajn nekonsciajn agojn, observu. Adamo, Adamo! Mi vian deziron plenumis, vi havas edzinon kaj vi ploras? Tiu ĉi ploro estas puno de via propra deziro, vin punas la peka pasio».

«Ho, serĉu, serĉu virinon!»

«Sed estus pli bone, se vi ne trovus ŝin, ĉar kruco pli granda per ŝi vin atendas!»

«Vin atendas klopoda laboro, kiam vi en la ŝvito de via vizaĝo manĝos panon ĝis kiam vi reiros en la teron, el ĝi vi estis prenita, ĉar vi estas polvo kaj en polvon vi reiros». (Genezis III, 19).

«Observu kaj pripensu por ke vi trovu la veron». (Penko Petrov.).

Estis granda silento. Patro Dio jam de longe ne parolis plu, nur de malproksima rozarbareto ekkantis najtigalo kanton dolĉan, funebre ameman, plormelodian, sopiron senkonsole longan, daŭran, senhalte man.

Kiam najtigalo eksonis la lastajn sonojn, Adamo kun koro premita sopire je amatino ekĝemis kaj li komencis voki sian Evon, sian belulinon. Ripetinta ŝian nomon, ke eĉis per ĝi la paradiz-montoj, li komencis serĉi sian edzinon kaj la eĉo de malproksimo ripetis Diajn vortojn: «Jen estas la viro kiu ne en Dio vidis sian forton, ne en sia animo, sian feliĉon, sed sentis sian forta per sia malbonpovado». (El la Biblio. trad. de L. L. Zamehof).

Kiam Adamo, por sia grandega ĝojo, Evon trovis, li jetis sin sur malican serpenton ekkriante:

«For de mi en la inferon, malbenita diablo!» — depuŝis ĝin de Evo kaj srkraĉante ĝin forpelis ĝin per piedbatoj.

(Daŭrigota)

## AL BELULINO

Kiel statuo vi estas ravega,  
Kaj kiel statuo marmora.  
Kiel statuo vi estas belega,  
Kaj kiel statuo senkora.  
Ĝi ĉiujn allogas kaj vi—allogema  
Sed ĝi tiu sama kaj vi perfidema!

## AL FIERULOJ

Hela, somera nokto. Elektra boato  
Glitas sur la spegulo de la lago beleta;  
Ŝaŭmaj ondoj klaketas, blovo malvarmeta  
Freŝigas fierulojn sur la blua glato.  
Ho, ĉarma promenado! Tie malproksime  
En belega ĝardeno kantas najtingalo...  
En barko oni kantas pri la kapitalo  
Pri fam', plezuro, ĝuo... voĉ' fluas senlime...  
Sonas, flirtas, petolas kaj ĝue ridetas...  
Sed subite ekblovis, ĉielo nigriĝas,  
Malproksimaj nubetoj la bordojn ombretas...  
Je iom ekfulmis... ĉiuj malgojiĝas...  
Silentiĝis la kanto... la koroj tremetas...  
Eĉ ĉe l' ŝajno de timo vi malferiĝas!ll...

## HOMARUJO

Ho, vi min ne demandu pri mia deveno.  
Ĉu vi min pli ŝatigus, se mi estus Dano,  
Anglo, Turko, Italo aŭ venka Japano?...  
Por mi estas neklara tiela kompreno...  
Por mi kiel poeto estas la posteno  
Ĉie inter homaro, kun ĝi mi esperas,  
Ĝojiĝas kaj festenas, aŭ... ploras, suferas...  
Kaj por ĉiuj egala mia ĉirkaŭpreno.  
Estas do unu Dio kaj unu homaro;  
La tuta mondo estas por mi la ĉarmujo,—  
Sincera familio, bonfara anaro  
Inter ĝi estas mia hejmo kaj patrujo.  
Dio! donu al Via tuta infanaro  
La klaran komprenigon pri la homarujoj!

ANTONO WIECZORKIEWICZ

## MALNOVAJ BOTOJ

## Monologo

Ni ĉiuj serĉas feliĉon, sed kiu estas tiel feliĉa kiel homo kolektema, kolektantulo? Vojaĝante, li ĉiam ion trovas por pliriĉigi sian kolekton. Hejme li ĉiam okupas sin aranĝante, ordigante, klasifikante la objektojn. Eniras amiko kaj diras «Kion vi faras?» «Mi-respondas-Mi studas miajn kolektitaĵojn.» La amiko miras, trarigardas ilin, petas mil sciigojn, kredeble nenion komprenas, dankas lin kaj foriras. Sed, renkontante alian li diras: «Mia amiko, Sinjoro Bruno, estas kleruro, scienculo, kaj havas mirindan kolekton.» Kaj, iom post iom, ĉiuj ekparolas pri la saĝeco de Sinjoro Bruno.

Ĉiu el mia familio kolektas. Mia edzino kolektas diamantojn, perlojn, punktojn, novajn ĉapelojn, k. t. p., sed mi ne aprobas ŝian guston kaj helpas ŝin plej eble kiel malmulte.

Unu el miaj filinoj posedas herbkolekton, florojn sekigitajn. Sed ili estas malbelaj, malbonodoraj. Ŝi pliigas la prezon de la fojno, kaj malmultigas la nutraĵojn de la ĉevaloj. Mi ne tute aprobas ŝian guston. Alia filino kolektas insektojn, precipe skarabojn kaj araneojn. Sed kompreneble ŝi devas mortigi ilin, kaj tio estas kruela, kaj la bufoj kaj birdoj en mia ĝardeno ne trovas sufiĉe por manĝi. Oni ne devus renversi la leĝojn de la naturo.

Mia plej maljuna filo tenas albumojn, dekduon da albumoj, plenaj je la fingreg-presajoj de liaj amikoj. Li diras ke ili estas pli belaj kaj interesaj ol ia ajn gravuraĵo aŭ fotografaĵo. Li nomas ilin fingregografajoj, vivantaj rememoraĵoj. Se iu vizitas nin, li diras «Bonvolu meti vian fingregon en la inkujon, kaj poste premi ĝin sur la paĝo en mia albumo, kune kun via nomo», kaj neniu kuraĝas rifuzi. Mi diris ke tia kolekto estas sensaĝa, sed li respondis «Ĝi estas tre utila; mi helpas eĉ la policanojn; se iu el miaj amikoj fariĝas mortiginto aŭ ŝtelisto mi povus montri lian fingromarkon en mia albumo kaj li estus arestata kaj kondukata en malliberejon».

La dua kolektas alian specon de markoj, poŝtmarkojn, sed pri li mi nur diros ke hodiaŭ mi demandis: «Ĉu vi povas ion rakonti al mi pri la reĝo de Zuvotiserapujo?» kaj li respondis: «En tiu-ĉi momento, mi forgesas, kara paĉjo, sed mi bone scias ke aŭtentika neuzita nedifektita ekzemplero el la dua elpresado de la flaveruĝa dekkvincentima triangula tiulanda poŝtmarko de la jaro milokcent sepdek naŭ estas altvalora, kaj mi ne volus vendi la mian por malpli ol kvinmil frankojn», «Kvinmil frankojn» mi diris, «sed per kia rimedo vi akiris ĝin?», «Ho» li respondis, ridante, «mi trovis ĝin sur la pavimo en la butikoj kie mi estis aĉetanta poŝtmarkojn», «Do vi estas ŝtelisto» mi ekkriis kolere, «Ho ne» li diris, «estas permesite forpreni harpinglojn, butonojn aŭ aliajn malgrandajn objektojn kiuj kuŝas sur la tero; poŝtmarko estas nur peceto da papero».

Jes, kiel mi diris, ĉiu el mia familio estas kolektanto, sed mi estas la plej serioza, tute honesta, laborema, neavara, senkulpa kolektanto. Mi multe penas sed nenion elspezas. Mi-neniun enuigas. Mi ne interŝanĝas. Mi nur kolektas objektojn al aliaj senvaloraj, la forŝetitaĵojn. Kompreneble

en la estonteco mia kolekto estos altvalora, sed mi ne pensas pri tio. Mia kolekto ankaŭ estas geografia, historia, scienca; sed plue, ĝi interesas min pri la homaro; ĝi inspiras sentojn de kompatato, simpatio, amo al aliaj homoj; ĝi vekas poeziajn pensojn en mia cerbo; ĝi edukas mian koron; ĝi plibonigas kaj nobligas min.

*Mi... kolektas... malnovajn botojn, ŝuojn ŝuetojn, pantoflojn, ĉiuspecajn malnovajn eluzitajn piedingojn esceptinte ŝtrumpojn kaj ŝtrumpetojn.*

Ha! vi ridas, sed iru al la muzeoj en la grandaj urboj. Ĉu vi ne vidas la botojn de la glora reĝo Ferdinando, la ŝuetojn de la Angla reĝino Elizabeto, aŭ la sanktajn pantoflojn de la papo Gregorio? Sed la miaj estas pli interesplenaj, pli instruaj, pli kortuŝantaj.

Aŭskultu! Mi promenas laŭlonge la marbordon, kaj tie, eble portitan de la ondoj post terura marventego aŭ de riverfluo, mi ekvidas boton, disŝiritan, rompitan; alian tagon, trankvile naĝantan sur la supraĵo de lageto, mi kaptas duonŝuon kaj ĝin savas de droniĝa morto. En angulo de malluma urbstrato, aŭ en dezerta kampo mi eltrovas pantoflon preskaŭ kaŝitan sub koto aŭ folioj. Kelkfoje vojaĝante en la vagonaro mi vidas forĵetitan boton apud la fervojo; mi haltas en la proksima stacidomo, kaj revenas piedire serĉante ĝin. En ia loko bonŝanco donacas al mi premiojn kaj aldonas alian trezoron al mia kolekto.

Sed post la kolekto venas la studado! Kiu foje posedis tiun ŝuon? Kiel okazis ke ĝi alvenis tien? Kia estis ĝia historio? Kiom da problemoj kiujn oni ne solvas facile. Apud la vojo en la kamparo mi eltrovas la restaĵon de boto, pereanta en la plektbarilo. Kiu ĝin enmetis tien kaj kial? Ĉar vi komprenas ke eĉ reĝo ne portas eterne siajn ŝuojn. Eĉ ili velkas kiel la blankaj lilioj kaj mortas. La lilioj iom post iom nigriĝas, kaj la botoj iom post iom paliĝas; jen la sola diferenco! Ĉu vi iam pripensis kien iras la reĝaj ŝuoj post kiam ili fariĝas tro malnovaj? Liaj korteguloj ne uzis ilin. Ĉu iu servisto en la palaco aŭ ĝardenisto en la parko? Sed poste kio okazis? Supozante que la laboristo aĉetis novan paron, ĉu li vendis aŭ donacis aŭ forĵetis la malnovajn? Kiom da malnovaj botoj estas forlasitaj; kien ili iras?

Neniu antaŭ mi iam kolektis tiujn antikvaĵojn. Ili neniel similas aliajn kolektojn, tiel ofte nur kopiojn: imititaĵojn, falsaĵojn. Oni imitas la bildojn verkitajn de famaj pentristoj; oni imitas Egiptajn skarabojn, Romajn lampetojn, prohistoriajn ilojn kaj batalilojn... ĉiom, ĉion.

Sed mia malnova ŝuaro estas vere natura. Se multaj entuziasmoj estus ŝukolektantoj, oni tuj komencus imiti ilin kaj fabriki falsaĵojn, sed, ĝis nun, neniu trompisto agis tiel perfide.

Atentu ankoraŭ! Ĉu vi iam rimarkis ke tre malofte oni vidas paron, fide lan paron da ŝuoj kune? Sed kial? Kial ni tiel kruele disigis post la morto du ŝuojn kiuj estis longatempe kunigitaj dum la vivo? Jen la sentimentala flanko de mia kolekto. Mi posedas tiom da ŝuoj izolitaj! mi serĉas iliajn kunulojn. Mi rerigardas en la urbstratojn, mi reesploras la eksterurbajn malpuraĵojn, esperante eltrovi la perditaĵon. Tre malofte mi sukcesas, sed mi ne malkuraĝas. Persistemo venkos. Iun tagon kredeble mi scios la historion pri miaj malfeliĉaj botoj, forlasitaj kaj forpelitaj de nedankemaj pose-

dantoj, kaj boto revidos botkunulon, ŝuo sian ŝuamikon, kaj senverte ili dankos min.

Gesinjoroj, mi humile petas ke vi helpu min; ne ke vi kolektu objektojn por mia interesa etnologia ŝumuzeo, aŭ por vi mem, ĉar mi ne deziras konkurantojn. Se vi ĉiuj de nun komencas similan kolekton, kaj serĉos en miaj plej fruktodonaj, tio estas ŝudonantaj lokoj, eble ni ekmalpaciĝos. Sed venu viziti mian kolekton, kaj diru al mi ĉu vi povas rekoni malnovan amikon, kiu foje apartenis al vi. Dum longa tempoj viaj paroj da botoj vin komfortis, vin protektis kontraŭ la ŝtonoj, la koto, la akvo, la malvarmo. Ne estas eble ke vi jam forgesis ilin. Simile al viaj homamikoj neniu boto havas vizaĝon tute similan al alia. Vi faros moralan agon. Vi povos rekunigi du ŝuojn kiuj foje kunvivadis feliĉe, sed kiujn malsano kaj maljuneco poste disigis. Mi ne petos donacojn de la botoj kiuj hodiaŭ vin ornamas. Ili estas tro novaj, brilantaj, belaj por mia kolekto, kaj mi nur akceptas en mian rifuĝejon la mizerulojn sen hejmo, sen kompatato. Mia domo estas vidvejo, vidvinejo. Do ĉu mi ne estas prava? Ĉu mia kolekto ne estas pli interesa, originala, pli morala kaj kontentiga ol tiuj de mia familio, ol juveloj, poŝtmarkoj, insektoj, kreskaĵoj aŭ fingregografaĵoj? Ilin oni vidas ĉie, sed nur en mia ŝuarejo historia-geografia-morala, kolekton de malnovaj botoj.

C. BICKNELL.

## LA HEROINO

Matildo sidis sur la kamp';  
Mallaŭte diris ŝi,  
«Se nur mi estus heroin'  
Ĝojega estus mi!

Se nur mi estus kiel ŝi.  
La franca Johanin',  
Militistino al batal'  
Ho! fama heroin'!

Aŭ se ŝipestro estus mi,  
Trankvila kuraĝul',  
Ventegon fortan regus mi,  
Min timus sovaĝul'.

Sed, antaŭ ĉio, estus rav'—  
Jes, plaĉus tre al mi


Esplori arbaregojn,—ho!  
Sopiri reve ŝi.

«Sovaĝajn bestojn venkus mi  
Per unu ekrigard':  
Leono, tigro kaŭrus ja  
Kaj eĉ la leopard'.»

Bovin' aperis sur la voj',  
Alproksimiĝis ĝi.  
Ĝin vidis heroin' Matild'  
Kaj ektimigis ŝi.

De timo tremis ŝia man'  
Malvarma ŝia kor',  
Leviĝis ŝi, kriegis «Ho!»  
Kaj tuj ŝi kuris for.

L. BRIGGS



## LA ANTIKVAJ MONUMENTOJ DE BARCELONO

(Daŭrigo)


La palaco, kie estas lokita la arkivo de la «Krono de Aragono», apartenas ja al pli progresema epoko; de la gotika arto restas nur kelkaj memorigaĵoj, kiel ekzemple, sur la pladŝtonegoj kiuj formas la pordarkaĵon kaj en la detaloj de la interkolonaro.

Estas rimarkinda en tiu konstruaĵo, la ligna plafonornamaĵo de Renesancarta stilo kun arabeskoj, kiuj tegas la ŝtuparan ripozejon.

Oni rimarkas ankaŭ tiun transiran stilon en la Domo

de la Ĉefdiakono, kies pordo estas bele superfluornamita, kiel tiu flankà de la preĝejo «Mercé», antikva portalo de tiu de Sta. Mikaelo, en alia nomita de la

Ŝtuparo de la domo «Dalmases»



Korto de la domo por resaniĝo. Ĉe la Hospitalo de la Sankta Kruco


«Canonja» kaj en multaj palacoj kaj apartaj domoj.

En la konstruaĵo «Llotja» la vizitanto estas agrable surprizita enirante ĝian internaĵon kie troviĝas tre vidinda salonego de gotika stilo, kies plafono estas subtenita per belaj fostoj el kiuj komenciĝas graciaj arkaĵoj duope lokitaj laŭlonge de la salono, formante la du subtenajn trabojn sur kiuj apogiĝas aliaj belaj fostetoj.



Tiu ĉi estas la sola atesto kiu restas de la antikva «Llotja de Mar», gotika konstruaĵo same kiel tiuj de Palma de Mallorca «Valencia» kaj «Perpignan» ĉiuj certe tre rimarkindaj.

Dum la lasta triono de la XVIII<sup>a</sup> jarcento la konstruaĵo «Llotja» estis rekonstruita je severa, ne malbela, sed tamen ne gracia stilo, kaj oni nur konservis de ĝia estinteco la salonon de kontraktoj, tiun, pri kiu ni parolis.

(Finos)



Doma pordo de la Ĉefdiakono



Episkopa Korto

## PRI MONATO MAJO

El «Le Petit Méridional»

Ĉiutempe, ĉe ĉiuj popoloj, la monato majo estis monato de publikaj festoj. En novembro, ja, oni pensas pri la kulto al la mortintoj, sed en majo oni festas la amon, la ĝojon, la patrinecon, la vivon. Kiel la homoj ne partoprenus en la ĝojego de la tuta naturo, kiu sin ornamas por novkreskinta verdaĵo, kiu sin bele kovras per siaj plej belaj floroj, por honori la eternajn edziĝofestojn de la Tero kun la Suno!

Majo estas la kvina monato de nia kalendaro, ĝi estis la tria de la roma. Romulus, kiu komencigis la Roman jaron sammomente kun la monato, marto, donis al tiu ĉi la nomon «Maŭs», por honori la senatanojn nomitajn «Majores». same kiel la sekvanta monato ricevis nomon «Junius», por honori la «Juniores», t. e. la junajn militistojn.

Aliaj pretendas, ke la nomo Majo devenas de la nomo de diino «Maia», patrino de Hermeso (*Merkuro*), dio de la Komerco, ĉar la Romanoj ekmarveturis ĉe la komenco de majo.

\*\*

La tuta monato estis unue dediĉita al Apolono. La unuan de majo oni oferprezentis lakton kaj fruktojn al la hejmaj dioj, kaj la romaj sinjorinoj faris misterajn oferojn al la «bona diino» de l' amo. Tamen la naŭan tagon, malgajega ceremonio malĝojigis tiun monaton dediĉitan al la plezuro; oni festis la Lemuri'ojn, aŭ festojn de la fantomoj, fonditajn de Romulus, por liberigi sin el la plendema fantomo de sia krimmortigita frato.

Stranga superstiĉo estis ankaŭ alskribita al tiu ĉarma monato: oni kredis, ke malfeliĉaj estas tiuj geedziĝintaj en la daŭro de majo, kaj Ovido, kiu prikantis ĉiujn monatojn de la roma jaro, diris: «La fraŭlinoj aŭ la vidvinoj atentu, ke ili ne eklumigu dum tiu monato la poredziniĝan lumigilon, tial ke ĝi povus baldaŭ fariĝi funebra torĉo...» Kiel oni vidas, la antikvuloj malfidis al la frutempaj de la amo konsiloj, kiujn maturigas kaj plisavigas la junia suno. Nun, en multaj provincoj de Francujo, oni diras ankoraŭ: «Maja edziĝofesto, morta edziĝofesto». Kaj la pastroj rifuzas sanktigi la geedziĝojn en la tuta daŭro de la monato.

Dum majo, ĉiutrijare, la Grekoj festis la grandajn Panatena'ojn, por honori Minervon. La unuan tagon de majo, iliaj nunaj posteuloj kovras per herboj la sojlon de sia domo kaj alpendigas florajn kronojn ĉe la pordo de sia fianĉino.

En Hispanujo ekzistas kutimo tute simila al farmaniero por la karnavalaj reĝinoj aŭ por la virginoj, kiujn oni festas en Franclando. La gejunuloj de vilaĝo elektas kiel reĝinon la plej belan vilaĝaninon, oni ŝin ornamas per blanka robo, florfoliaĵo, kaj ĉirkaŭ ŝi oni dancas la volupteman dancon de Maia.

En Italujo, la junulinoj festas ankaŭ nimfon Egerion, kiu, laŭ legendo havis la povon doni la vivon.

\*\*

En Francujo, kiu provinco, kiu vilaĝo ne havas siajn specialajn majajn festojn? Preskaŭ ĉiuj tiuj diversaj ceremonioj prezentas postsignojn de la plej antikva epoko. Nekalkulebla estas la nombro de la «Majaj Fontanoj», kien oni ne forgesas pilgrimi, por peti la favorojn de la tiea protektantino. Ifoje, ĝi estas la ĉagrenplena animo de virgino, kiu, iam, dronis en la fontanon pro amo al «Ĉarma Princo», kiu ne venis akurate ĉe la rendezuejon; alifoje, ĝi estas mirinda feino, kies tutblankan fantomon oni ekvidas en la nebuleca roso dum la majaj matenoj; aŭ ankaŭ, ĝi estas la bona virgino Mario, la Madono, kiun la suferantoj neniam vane alvokas; la fraŭlino venas, matene, dum naŭ sinsekvaj tagoj, peti de ŝi la fianĉon de ili elektitan, la junaj edzinoj petegas, ke ŝi donu al ili idon antaŭ la fino de la jaro; unuj kaj aliaj alportas, kiel ateston de sia fido, bukedojn da konvaloj; tufojn de lekantoj, branĉojn de kratago, kaj, vespere, la fontano malaperas sub bonodoranta bedo de blankaj floroj, kiuj malrapide velkas.

En Provencujo, la unua de majo estas la «festo de la Maje»; tie oni festas la revenon de la Printempo, promeniĝante junulinon ornamitan per floroj. En la departamento Dauphiné, tiam estas la festo de la Plugistoj. Sed ĉe la laboristaro, la unua de majo fariĝis la libera festo de la Laboro; la printempaj kantoj ŝanĝiĝas (en insultaj krioj de kolero aŭ de malamo, kaj, iafaje la sango ruĝiĝas, ho ve! la senkulpajn blankajn florojn.

Ĉe la tuta franca kamparo, oni faras dum la monato majo la ceremonion de Rogacioj. Ĝi estas la beno de la terproduktaĵoj, de la brutaro, de la rikoltoj por la jaro.

\*\*

En la malnovaj tempoj, la unuan de majo, oni plantis antaŭ la domo de la landaj potenculoj arbon aŭ dikan branĉon kun verdaĵo, kiun oni nomis «la Majo». Tiamaniere oni honoris la maljunulojn, kiuj estis la konsilantoj de la komunumo kaj la komunumestron inter ili elektitan.

Ĉe Paris'o, la provtempaj junuloj en la juĝeja kortego solene plantis la Majon en la korto de la Juĝeja palaco. Tiu korto estas ankoraŭ nomita «Korto de Majo». Francisko I-a. donis al ili la privilegion, dehaki en liaj arbaroj la arbojn de ili elektitajn por la Maja ceremonio, kaj sekve de tiu rajto, dudek kvin junuloj riĉe vestitaj kaj ĉirkaŭitaj de multnombra sekvantaro iris en la arbaron de Bondy, ĉe kiu ili markis tri kverkojn, kiujn ili dehakigis, kaj el kiuj unu estis starigata en la Korto de Majo, la du aliaj estis vendataj kaj tiel helpis pagi la elspezojn de ĝoja festeno, kiu kunigis ĉiujn junulojn.

Dum la Revolucioj de 1789 kaj de 1848, oni plantis multegajn arbojn, por montri sian ĝojon pri la akiritaj liberecoj. La Arbo de Majo tiel fariĝis «La Arbo de la Libereco». Oni vidas ankoraŭ kelke da tiuj arboj sur la publika placo de iuj vilaĝoj.

C. DES CORDELIERS  
Esperantigis ROKSANO

7<sup>a</sup> INTERNACIA KONGRESO DE ESPERANTO

**Antverpeno, 20-27 aŭgusto 1911 — LITERATURAJ KONKURSOJ**

*Estimata Sinjor (ino):* Ni havas la honoron sciigi al vi, ke okaze de la 7<sup>a</sup> Kongreso ni organizas literaturajn konkursojn, en kiuj ĉiuj esperantistoj povos partopreni.

La manuskriptoj devos esti alvenintaj antaŭ la 1<sup>a</sup> de Julio ĉe la sekretario kasisto; ili ne povos esti skribitaj de la aŭtoro mem, kaj devos porti devizon, ripetitan sur fermita koverto enhavanta la nomon de la verkinto.

*Varma alvoko estas farata al ĉiuj esperantistaj eldonistoj, administracioj de esperantistaj ĵurnaloj, esperantistaj organismoj, aŭtoroj kaj ĉiuj bonvolemaj samideanoj, por ke ili aljuĝu, kiel eble plej baldaŭ, premiojn kaj difinu temojn.*

La ĝisnunaj favorantoj de la konkursoj estas.

1. **Loka organiza komitato de la kongreso.**—*Historio de Esperanto*, ± 20 paĝoj, formato de «Belga Esperantisto». 1<sup>a</sup> premio: 100 frankoj = Sm. 40; 2<sup>a</sup> premio: 50 frankoj = Sm. 20.

2. **Redakcio de «Belga Esperantisto».**—*Originala novelo* ± 12 paĝa, formato de B. E.—Premio: 50 frankoj = Sm. 20.

3. **Antverpena Grupo Esperantista.**—*Pri la utilo de Esperanto por la komerco; kiel enkonduki la uzadon de nia lingvo en la komercajn rilatojn.* 5 paĝoj, formato de B. E. Premio: 50 fr. = Sm. 20.

4. **La Verda Stelo.**—*Pri la utilo de Esperanto por la laboristoj; kiel enkonduki nian lingvon en la laboristaron.*—Premio: 50 fr. = Sm. 20.

5. **S-ro Frans Schoofs.**—*La malnova flandra pentrista skolo.* Premio: 30 fr. = Sm. 12.

6. **S-ro D-ro Pedro Ruiz Prieto,** Sevilla.—*Plej taŭga procedo kaj plej efikaj rimedoj uzotaj de la Esperantistoj kaj speciale de la Internaciaj Kongresoj, por atingi de ĉiuj Registaroj la oficialan starigon de la deviga instruado de Esperanto en la duagradaj lernejoj.* Premio: 100 fr. = Sm. 40.

7. **Tutmonda Esperanto Anoncekspedo,** firmo Th. Anding, Berlin S. W. 48.—*Verku efikan broŝuron pri la utilo kaj la agado de la T. E. A. (kun modelaj ekzemploj pri la plej bona uzo de la T. E. A. - laborfakoj)* Minimume 7 prespaĝoj laŭ monoformato. Premio: 12.50 fr. = Sm. 5. kontanta mono kaj por 12.50 fr. = Sm. 5 da Esperanto-specialaĵoj.

8. **S-ro Oscar Van Schoor.**—*Pri la batalo por la akiro de la lingvaj rajtoj en malgranda lando, ekz. Bohemujo, Kroatujo, Flandro aŭ alia.* ± 5 paĝoj formato de B. E. Premio: 30 fr. = Sm. 12.

9. **Libera Penso,** internacia societo de esperantistaj liberpensuloj.—*Libera penso en la moderna literaturo.* Premio: 25 fr. = Sm. 10.

**Belga Esperantisto kaj Oficiala Gazeto** publikigos regule sciigojn pri la konkursoj.

Ni permesas al ni la liberecon nin turni speciale al vi, por vin peti, ke vi helpu al nia entrepreno.

Esperante, ke vi bonvolus havigi al ni baldaŭan favoran respondon, ni prezentas al vi, kune kun la esprimo de nia antaŭdanko, tiun de niaj plej koraj sentoj.

LA SEPO POR LA SEPA:

**Van der Biest-Andelhof**  
Prezidanto;

**O. Van Shoor,**  
Vicprezidanto;

**D-ro W. Van der Biest,**  
Sekretario-kasisto (Adreso: 76, Minderbroedersruĝo Antwerpen);  
**M. Posenae, L-to F. Dupont, L. Ritschie, F. Schoofs.**

Pri la reklamoj en la Kongres-libro, vidu l'anoncon en la 2.<sup>a</sup> paĝo de la kovrilo.

## DIVERSAJ SCIIGOJ

**El Bohemujo.**—Detala vortaro Bohemo-Esperanta, estas elironta en la kolekto de Ĉasopis Ĉeskych Esperantistu en Praha. Ĝia prezo 4-5 K., donas la esperon ke ĝi estos verko rimarkinde ampleksa, kiu egalos niajn vortarojn nacilingvaj. Oni laboris pri ĝi jam de kelke da jaroj, kaj nun estas kolektataj mendoj de la aĉetontoj, por ke oni povu fiksi la nombron de presotaj ekzempleroj.

La urbeŝtraro de Karlin—antaŭurbo de Praha—donis subvencion da 100 K. por subteni la informan kancelarion.

En Praha kaj la ceteraj urboj bohemiaj, estas malfermitaj pli multe ol 50 kursoj.

En la Komitaton de la Bohema Landa Ligo por akceli la turisman movadon estas invitita delegito de la C. A. Bohema Unio Esperantista.

Esperantista Klubo en Zizkov, fondis muzikan sektion. Lotbiletoj de la loterio por subteno de la vidvinoj post la poŝtoficcistoj, enhavas inter la diverslingvaj tekstoj, ankaŭ tekston Esperantan. Ankaŭ sur la nova hotelo «Ora Ansero» estas la Esperanta traduko fiksita inter la ceteraj dudek lingvoj.

En du kinematografoj en Praha aperas antaŭ ĉiu prezentado, lumbilda reklamo por Esperanto.

Inter la novaj kluboj ni citu precipe tiun en Radvanice, kiu estas la unua klubo en Silezio. Ĝi havis en la lasta tempo jam 56 membrojn kaj tre sukcese laboras.

En la komerca Akademio en Prostejov—Moravio—instruas pri Esperanto S-ro. Pitlik 80 lernantojn.

Kiu fremdlanda samideano deziras ekligi rilatojn kun Esperantistoj bohemiaj, mendu ĝin ĉe la C. A. Bohema Unio Esperantista en Praha II. Vo-diĉkova ul. 38.

Senpage enpresas adresojn de fremdaj korespondantoj, redakcio de Ĉasopis Ĉeskych Esperantistu en Praha II. Dittrichova ul. 7.

\*\*

**Jubilea festo** de aŭstria esperantistoj okazos la 3<sup>an</sup> — 5<sup>an</sup> de Junio 1911 en Brno-Brünn, pro festi 10 jaran jubileon de fondo de unua grupo esperantista en Aŭstrio. Programo estas sekvanta: Sabate la 3<sup>an</sup>, vespere; Akcepta festo. Dimanĉe la 4<sup>an</sup> antaŭtagmeze: Bohema parolado propaganda; posttagmeze: Vizito de la urbo; vespere: Kunveno de esperantistoj partoprenantaj. Lunde la 5<sup>an</sup> Ekskurso al abismo Macocha kaj novaj grotoj: La aliĝojn akceptas: Klubo de bohemiaj esperantistoj en Brno Kozi ul. 10, Moravio, Aŭstrio.

\*\*

**Granda Esperanta Ekspozicio.**—Okaze de la VI.<sup>a</sup> Germana Esperanto-Kongreso, 3<sup>an</sup> ĝis 9<sup>an</sup> de Junio 1911 en Lübek, oni aranĝos por la vizitontoj de la Kongreso kaj por la neesperantistoj grandan publikan Esperanto-Ekspozicion. Ĝi enhavos apartaĵojn por Esperanta literaturo, historio de la mondlingva movado, verkoj eldonitaj pri Esperanto, Esperanta gazetaro, aplikado kaj uzado de Esperanto por kaj per diversaj fakoj, statistiko, grupaj aferoj, k. t. p. La bone organizita kongreskomitato kaj la Germana Esperanto-Asocio garantias la zorgeman konservadon kaj la akurantan redonon de la senditaj objektoj. Oni povos sendi la ekspoziciajn objektojn aŭ prunte aŭ donace. La pruntitaj objektoj estos resendataj aŭfrankite al la sendintoj tuj post la fermo de la Ekspozicio. Oni skribu sur ili la literon «R» kaj la nomon (plejeble per ŝtampilo) de la posedanto. La donacitaj objektoj restos post la Kongreso propaĵo de la Germana Esperanto-Asocio,



kiu konservos ilin kiel migran ekspozicion. Ĉiujn sendaĵojn oni adresu al Dr. Möbusz, Falkenstr. 12, Lübeck (Germanujo).

«Lumon» esperanta grupo de Terrasa.—La 5<sup>an</sup> el la pasinta Marto, posttagmeze, okazis grava konferenco ĉe la granda halo de la «Fraternidad Republicana» pri la temo «Esperanto kiel internacia, helpa lingvo» kiun donis la fervora esperantisto kaj lingva profesoro. S-ro Delfi Dalmau. La grandnombra ĉeestantaro kiu plenigis la vastan halon de tiu Societo, vere restis entuziasmigita de la sincereco kaj sindonemeco kun kiu li parolis, vekante en ĉies koro afablan senton por nia kara lingvo. Granda aplaŭdado kronis liajn lastajn vortojn, kio certe pruvas la sukceson kiun li atingis.

2.<sup>a</sup> Itala Kongreso de la Esperantistoj. Genova.—Ĝi okazos de la 25<sup>a</sup> ĝis la 28<sup>a</sup> de tiu ĉi monato, organizata de la Genova Esperanta Unuiĝo. Prezo de la aliĝilo 2 Sm. Pri informoj skribu al la Prezidanto de la Organiza Komitato: S-ro D-ro Alfredo Stromboli. Via Assarotti, 54-15, Genova.

Barcelona Esperantista movado.—Ĉiusemajne okazas «Verdaj Vendredoj» ĉe «Espero Kataluna», kiuj konsistas el interdiskutadoj, amuzaj ludoj, spritaĵoj, k. t. p.

Samideanaj kunvenoj okazas ĉiu sabato ĉe kafejo «Universitat». Ĉiu vendredo kunvenoj ĉe grupo «Semo»; interdiskutadoj kaj babiladoj.

La 26<sup>an</sup> de Februaro, vizito al la Industria Universitato kaj Ekspozicio de la Sociala Muzeo. Neforgesebla estos al ĉiuj ĉeestintoj tiu interesa vizito, aranĝita de «Espero Kataluna». Pli ol cent gesamideanoj ĉeestis, kiuj akompanitaj de S-ro Profesoro de I. U. admiris la funkciadon de la belaj maŝinoj, la artan pentrejon, ĥemian eksperimentejon, per unu vorto, ĉiujn ĉambrojn kaj salonojn de tiu grava, interesplena Lernejo, same kiel ĉiujn de la nomita Ekspozicio. Je la unua posttagmeze finis tiu ripetinda vizito.

Ankaŭ «Espero Kataluna», okaze de la 7.<sup>a</sup> Internacia Kongreso de Esperanto organizas Karavanon de Barcelono, zorgante pri ĉiuj detaloj (aliĝo, loĝado, k. t. p.), kiujn de nun povas demandi al ĝi ĉiuj partoprenantoj.

### PAUL BERTHELOT

En la malproksima Brazilujo, mortis juna apostolo de Esperanto, kies nomo estos per ĉiam kunigita al tiu de Kataluna Esperantismo.

En la jaro 1905, kiam en la tuta Katalunujo estis nur du aŭ tri grupoj esperantistaj, S-ro Paul Berthelot tiam loĝanta en Ceret, faris la laborojn necesajn por fondi Katalunan federacion. Li nomis ĝin «Aplech Esperantista de Catalunya», kaj publikigis dum kelkaj monatoj la gazeton «Espero de Katalunjo», organon de l'«Aplech». Dank' al liaj klopodoj oni povis organizi en Barcelono, grandan esperantan feston ĉeestatan de multaj esperantistoj francaj, kiu havis lokon en la teatro Fivaller (eskuerra de l'en-sanxe).

L'«Aplech Esperantista de Katalunujo», unua societo kun ĝenerala karaktero en Katalunlando, enhavanta pli ol 150 membrojn, havis kiel patron S-ro Berthelot.

Pro tio, lia nomo estos per ĉiam kunigita al tiu de Kataluna Esperantismo.

J. BREMON

## HUMORAĴO

Oni diras ke iu reĝo estis tiel malpura ke li eĉ forgesis ofte pri sia tualeto. Iam unu el siaj paĝoj vidis sur lia vesto ion kion li tre kaŝe forigis; tamen, rimarkinte tion la reĝo kaj scivolemekscitita al li demandis: kio estas tio? Sinjoro estas pediko kiun mi forĵetis. La reĝo tre dankema rekompencis lin. Alia paĝo dezirante ankaŭ rekompencon, ripetis la saman aĝon de sia kunulo t. e. ŝajnis kvazaŭ li demetas ion de la vesta reĝo. «Ĉu denove? kio estas tio», demandis la reĝo. «Nenio Sinjoro, nur estas pulo kiun mi forĵetis» «Insultemulo!» ekkriis la reĝo, kolerita. «Ĉu vi kredas ke mi estas hundo?» kaj ordonis vipi lin.

LEONARDO RENOM

## BIBLIOGRAFIO

LA PENA DE MUERTE (la mortpuno). Kastila traduko de la opinioj pri ĝi, publikigitaj en *Voĉo de Kuracistoj*. Tradukisto S-ro Jorge S. Hita, kuracisto. Prezo: 2 pesetoj (0<sup>o</sup>80 Sm.). Aĉetebla: S-ro Luis Torné, Bazar Modernista, La Arboleda, Bilbao.

BEN-TOVIT.—Rakonto de Leonido Andreev. Tradukis D-ro A. Fiŝer-Tiflis. Kolekto de «Riga Stelo». N. 1. Prezo: 0.10 Sm. Krebsstr. 11. Riga. Ruslando.

LE PROBLÈME DE LA LANGUE INTERNATIONALE.—E. Boirac. Prezo: 0.25 fr. Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy. Paris.

ESPERANTO POŝKALENDARO POR 1911.—Redaktoro kaj Eldonanto Fritz Stephan. Prezo: 0.30 Sm. Kochstr. 61 Leipzig. Alemania.

DU PAROLADOJ.—Barcelono 1909. Augsburg 1910. De Edmond Privat. Kun antaŭparolo de Prof. Th. Cart. Prezo: 0.25 Fr. (0.10 Sm.). Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

TREZORO DE LA RAJAHO.—Poemoj, Hungar-kronika bildo. Humoraĵoj. N.º 1-a de «Malgranda Biblioteko Esperanto». Prezo: 3 hel. (0.15 Sm.). Eldonaĵo de «Hungara Studento».

DU RAKONTOJ.—De A. Ĉeĥov. «Veto» kaj «Ŝi volas dormi». Tradukis B. Kotzin. N.º 2 de «Rusa Biblioteko». Prezo: 10 kop. (0.10 Sm.). Moskva Librejo «Esperanto». 26. Tverskaja, Moskvo, Rusujo.

LA ELEMENTOJ KAJ LA VORTFARADO.—Gramatiko kaj Sintakso en Esperanto kun notoj pri la novlatinigo «Ido». E. Ĉefeĉ. Prezo: 750 Spesoj. Eldonintoj: G. Warnier & K. O., 15, rue Montmartre, Paris. La tuta verko estas rimarkinda, sed kiel kuriozaĵo kiu altiris nian atenton, legu tion:

Ekzemplo de kruda Esperanto:

«Voje alpojn Chavez adiaŭinte amikojn aeroplane bonspirite altecen flugis Geneve. Italoj domodosolaj vidis aeroplanon ĉiele teren falegantant, senvivigantan malfeliĉan Chavezon».

La sama ekzemplo ellaborita kaj pliprecizigita per la uzo de la radikoj senpere uzablaj:

«Sur la vojo trans la alpojn Chavez, post kiam li estis adiaŭinta siajn amikojn, flugis en aeroplano de Ĝenovo en bona spirito en la altecon.

La italoj en Domodosolo vidis, ke la aeroplano falegis el la ĉielo sur la teron kaj, ke ĝi senvivigis la malfeliĉan Chavez».

La libro finas per interesa tabelo de ĉiuj formoj de la konjugacio (esperante, angle, germane kaj france), kiujn Esperanto tradukas per la kopulo *esti* kun predikatece uzataj participoj (aktiva kaj pasiva) jene:

*Pasanteco*: mi est-os, as, is skribonta. *Pasanteco*: mi est-os, as, is skribanta. *Pasinteco*: mi est-os, as, is skribinta. *Kondiĉeco*: mi estus skrib-onta., anta, inta. *Dezireco*: Ke mi estu skrib-onta, anta, inta. *Sendifineco*: esti skrib-onta, anta, inta.

**KONKORDANCO AL LA KRESTOMATIO.** N. — 4 de «La Verda Stelo Serio». Verkita de J. C. O'Connor, Ph. Dr., M. A., kaj C. F. Hayes. Unua parto. La participoj. Prezo: 0.13 Sm. Pionira Librejo Esperanta, 135, sellin-court Road. London, S. W.

Sin inspirante en la sentenco «pli mallonga estas la vojo per ekzemploj ol per reguloj» la aŭtoroj verkis tiun libreton montrante en ĝi la numeron de la paĝo kaj linio de la Krestomatio, kie oni povos trovi ekzemplon de la uzo de ĉiuj ĝiaj participoj.

**AVIZO.**—Al S-roj Abonantoj, kiuj ankoraŭ ne sendis la jaran abonpagon, ni petas ĝin sendi kiel eble plej baldaŭ.

**REDAKCIA KORESPONDADO.** — S-ro. F. Kaŭlfers. (Franzendorf — Germanujo). Ni klopodos komplezi vin. Jes, ni akceptas respondkuponon. S-ro. E. Batck. (Ričany — Bohemujo). Vi estas tro afabla. Korajn dankojn.

S-ro. P. A. (Barcelono) — Bone, sed ne tre; iomete aranĝitaj, ili aperos. Ni dankas.

M. C

# ESPERO KATALUNA

TALLERS, 81, ĈEFA ETAĜO  
BARCELONO

La plej malnova Esperantista Societo el Katalunlando

Biblioteko kun pli ol 300 volumoj.

Ankaŭ pli ol 70 nunaj kaj diversaj gazetoj kaj revuloj Esperantistaj ĉiam legeblaj.

Senpagaj kursoj de Esperantoj, klarigitaj de lertaj geesperantistoj.  
Amuzaj "Verdaj Vendredoj" por praktiki Esperanton.

Teatraj prezentadoj, ekskursoj, festenoj, k. c.

MONATA KOTIZAĜO . . . . . 1 Peseto

# ESPERANTO GERMANA ESPERANTISTO

## ★ RESTORACIO ★

Strato Asalto, 54 - BARCELONO

Biero, vinoj, ĉampano, kaj ĉiuspecaj likvoroj, Esperanta manĝaĵo ĉiusemajne.

Esperantistoj! Venu tien-ĉi!

ONI PAROLAS ESPERANTE

Monato gazeto por la vastigado de la lingvo Esperanto  
Monatsschrift für die Verbreitung der Esperanto-Sprache

Tiu ĉi gazeto, nun el la plej malnovaj esperantaj jurnaloj, estas redaktata esperante kaj germane. Kun ĉiam varibla enhavo: originalaj aŭ tradukitaj artikoloj pri ĉiuj temoj, propagando, kroniko, literaturo, bibliografio, korespondoj, konkursoj, konsilioj por la praktika vivo, instruoj por lernantoj, oficialaj informoj ktp.

Jara abonprezo 3 M. (3.50 Sm.) en ĉiuj landoj.  
Prova abono por 6 monatoj 1.50 M. (0.75 Sm.)

Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin SW, 68, Lindenstr. 18-19

LUEBLA

## ESPERANTISTA POSKALENDARO por la Jaro 1911

Redaktoro: Prof. Dro Siegr. Lederer, Prago.

Ĝia enhavo, ĉe pli rika ol tiu de la antaŭaj eldonoj, konsistas el anabaŭstila kalendaro, interesaj artikoloj, praktikaj tabeloj kaj kompleta listo de ĉiuj grupoj esperantistaj, speciale ni atentigas pri ĉi tiu enigma konkurso, 100 M. da monpremio!


Prezo: 1 M. (0,500 Sm); aŭfrankite ĉien 1.20 M. (0,600 Sm).

Por mendantoj ĝis la 15<sup>a</sup> de Novembro: 0,30 M. (0,400 Sm), aŭfrankite ĉien 1. — M. (0,500 Sm).

Oni postulu specialan prospekton de Esperanto Verlag Möller & Borel  
Berlin SW, 68, Lindenstr, 18-19 kaj korespondantoj.

## ĈAPELOJ KAJ ĈALPOJ

Oni vendas ilin malatpreze



MANUELO BALLESSI

Strato Ample, 41, apud Regomir  
BARCELONO (KATALUNUJO)